

Speciala
Kongresa
Numero

Antaŭkongreso en Brno
Kongreso de blinduloj
Infana Kongreseto
Junulara programo



ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



**SOLENA MALFERMO
DE LA 81. UK**



☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
aperas 6-foje jare. Abono 15 gld.

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio,
800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por
duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla
reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30%
rabato.

Membrokotizoj: A 160 Kč, B 80 Kč, (C
nuligita), D 40 Kč, E 40 Kč, F 3200 Kč, G
100 Kč (Starto), eksterlandanoj 20 ECU,
enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: 335 Kč komencantoj,
240 Kč progresintoj. Aliĝoj: Mgr. Vlasta Janá-
ková, Smetanova 26, 541 01 Trutnov.

Pragaj Sonoriloj

Ĉi tiu numero de Starto estas speci-
ala, solena, ĉar finiĝis la 81-a Univer-
sala Kongreso de UEA en Prago. Finiĝis
ankaŭ la oficiala antaŭkongreso en Brno,
la 62-a Kongreso de Blindaj Esperan-
tistoj en Prago, 30-a Internacia Infana
Kongreso en Rabyně kaj la 30-a ILEI-
konferenco (E-instruistoj) en Tábor.

Sub la titolo "Pragaj sonoriloj" nia
kongresa kuriero (4-paĝa ĵurnaleto) du-
foje tage informis la kongresanojn, kio
okazos aŭ jam okazis. Aperis 11
numeroj kun 4 aldonoj, entute 60 paĝoj.
El la kuriero ni ĉerpos multajn artikolojn
por ĉi tiu numero de Starto, por ke
ankaŭ ceteraj gesamideanoj povu ĝui
aŭtentikajn tekstojn, el kiuj ankoraŭ
elradias la kongresa etoso.

Prago kunvenigis 2972 kongresanojn

el 66 landoj, sed venis ankaŭ dekelk
ĵurnalistoj kaj kelkhoraj vizitantoj, do
certe ni estis pli ol 3 mil personoj. Inter
la kongresanoj verŝajne plej grandan
atenton vekis la Nobel-premiito prof.
Reinhard Selten, niaj klasikuloj Marjorie
Boulton kaj William Auld, plue sam-
ideanoj el Afriko invititaj de UEA,
magiisto Trixini aŭ ekzemple komikulo
"fraŭlino Barlaston".

Kvin gesamideanoj estis honoritaj per
la titolo Honora Membro de UEA (tri
niaj), estis akceptita Manifesto de Prago
kaj Kongresa Rezolucio.

Salutajn telegramojn sendis politikis-
toj Václav Havel, Boutros Boutros
Ghali, Federico Mayor kaj kardinalo
Miloslav Vlk.

La kongresa programo konsistis el
190 programeroj, inter kiuj speciale
grava estis Nitobe-seminario, kiun parto-
prenis reprezentantoj de UN, Unesko,
Eŭropa Parlamento kaj de kelkaj ne-
registaraj internaciaj organizoj. Enkadre
de la kongreso realiĝis ankaŭ Internacia
Kongresa Universitato kun 9 prelegoj de
elstaraj esperantistaj sciencistoj.

Dum la kongreso funkciis ankaŭ
libroservo kun ampleksa stoko de libroj,
ankaŭ multaj novaĵoj, kvankam kun
prezoj iom neatingeblaj por niaj poŝoj.

Pri la glata funkciado de la kongreso
zorgis kelkdekkapa taĉmento de helpa-
toj, al kiuj apartenas speciala danko.
Malfermita estis dudeko da ĝiĉetoj, en
kiuj ili deforis de la 8-a matene ĝis la
22-a aŭ 23-a vespere. Kompreneble ili
komencis labori jam en la mezo de la
antaŭa semajno kaj laboris ankaŭ dum la
ekskursa merkredo.

Finigis „Nia 62-a“

En la tagoj de la 13-a ĝis la 25-a de julio, en la kadro de la 81-a UK, okazis en la Praga hotelo Vltava jam la 62-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (IKBE). Ĝin partoprenis 95 personoj el 18 landoj de Eŭropo, Azio kaj Ameriko. La plej nombra delegacio alveturis el Rusio (ĉirkaŭ 30), el Ĉeĥio partoprenis 10 personoj.

La 62-a IKBE, al kiu ni donis la amikan nomon „Nia 62-a“, okazis ĝuste 75 jarojn postkiam, samtempe kun la 13-a UK en Prago, okazis la unua Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj.

La labortemo de la ĉijara kongreso estis: Blindaj esperantistoj kaj la ĝenerala blindulmovado. Dum la kvin labortagoj la kongresanoj klopodis serĉi vojon, kiamaniere pligrandigi la rolon de la internacia lingvo en la landaj, eŭropaj kaj mondaj blindulorganizajoj.

La partoprenintoj povis aŭskulti prelegojn pri porblindulaj temoj, estis informitaj pri la ĉeĥa kulturo kaj muziko speciale, promenis tra la historiaj kvartaloj de Prago kaj aŭskultis entute kvar koncertojn.

Dum la tutaga ekskurso la gekongresanoj vizitis la moravian urbon Olomouc, kie ili povis i. a. aŭskulti la faman Engler-orgenon el la jaro 1745, kaj konatiĝi kun la tiea blindulcentro Tyfloservis, kie ili povis rigardi kaj aĉeti diversajn ĉeĥiajn kaj eksterlandajn blindulhelpilojn.

Ĵaude posttagmeze okazis speciala vend-ekspozicio, en kiu kelkaj pragaj

firmaoj prezentis blindulhelpilojn, kiujn ili produktas. Oni povis konatiĝi kun la speciala linio, per kiu blindulo povas legi en brajla skribo informojn el komputilo, porblindulajn horloĝojn, kalkulilojn, skribmaŝinojn kaj eĉ la Esperante parolantan pesilon kaj termometron.

Kompreneble, ne mankis ankaŭ arta vespero, dum kiu multaj partoprenintoj prezentis siajn seriozajn kaj amuzajn programerojn.

La nedisigebla parto de ĉiu blindulkongreso fariĝis kunsidoj de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE), kaj ankaŭ ĉijare ĉi tiu organizaĵo havis dum la kongreso siajn du laborkunsidojn.

Kompreneble, tian grandan aranĝon la blindulsekcio de Ĉeĥa E-Asocio ne povis efektiviĝi nur per siaj fortoj. Finance prenis sur sin la respondecon Unuiĝinta Asocio de Nevidantoj kaj Malfortevidantoj, kiu transprenis ankaŭ multajn organizajn taskojn.

Multe kaj efike helpis ankaŭ geanoj de la E-klubo en Praha, precipe ĉe akompano de blindaj partoprenintoj.

Kiel decidis la dua laborkunsido de LIBE, la venonta kongreso de blindaj esperantistoj okazos venontjare en Ukrainio.

Jiří Vychodil
prezidanto de la
Blindulsekcio de ĈEA

Brno

sukcesa komenco de la Praga UK

Inter la 14-a kaj 20-a de julio aranĝis Ĉeĥa Esperanto-Asocio kunlabore kun la Kongresa kaj Kleriga Entrepreno KAVA-PECH oficialan antaŭkongreson sub la nomo „Moravia folkloro al la mondo“. Por partoprenantoj de 12 landoj (krom la eŭropaj ankaŭ de Brazilo, Israelo, Japanio kaj Koreio) estis preparita ne nur bunta kaj plaĉa, sed ankaŭ tre valora folkloro programo kunlabore kun pinta fakulo pri folkloro J. Kris de la Instituto pri popola kulturo en Strážnice. Moraviajn dancojn kaj kantojn prezentis inter alie famaj ensembloj Křenová el Křenovice kaj Konopa el Ratiškovice, konataj en multaj, ankaŭ ekstereŭropaj landoj. Krom komunaj ekskursoj al Slavkov, Čejkovice, Náměšť, Kralice, parto de la ekskursantoj vizitis ankaŭ la ĉefurbon de Slovakio Bratislava kaj malpli granda parto - la pli kuraĝaj - piede konatiĝis kun la bela montetaro Pálava. La partoprenantoj ekkonis ankaŭ la historian kemon de Brno kaj vizitis Moravian Landan Muzeon, Muzeon de Leoš Janáček, kelkaj ankaŭ Mendelanium.

Lunde okazis solena akcepto ĉe la urbestro Dr. Dagmar Lastovecká en Kavalira Salono de la Nova Urbodomo. Pro viglaj demandoj de esperantistoj ŝi dediĉis al ni duoblon de la origine planita tempo.

Nian ĉeeston en la urbo rimarkis ankaŭ la loka stacio de Ĉeĥa Radio en Brno kaj ĝia redaktoro Věra Staňková

dufoje envicigis programojn pri la antaŭkongreso kaj intervjuis ankaŭ eksterlandajn gastojn, s-rojn J. Marin (FR) kaj T. Hirayama (JP).

La tuta kultura programo efektiviĝis en Spegula Salono de hotelo SLOVAN, krom la adiaŭa vespero, kiu pasis en la burĝa vinejo de Špilberk. Tie ni ĝuis ne nur kordcimbalo muzikon, bongustajn manĝojn kaj vinon, ĉar la programon spicis mallonga koncerto de pola ensemblo, kiu haltis tie survoje al UK por prezenti al la antaŭkongresanoj kelkajn polajn kantojn.

Ĉiam regis dum la antaŭkongreso bona Esperanto-etoso kaj humoro. Ofte akompanis nin ankaŭ esperantistoj de Brno fronte kun la kluba prezidanto Z. Hršel, al kiuj mi volas esprimi apartan dankon pro la helpo, precipe dum la alventago.

Grandan plezuron post la streĉa laboro alportas al organizintoj dankesprimoj de la partoprenintoj. Ni citu almenaŭ fragmenton de la letero de geedzoj Suzuoki el japana urbo Kobe: „La antaŭkongreso estis tiel bone aranĝita, ke ni ambaŭ vere ĝuis la etoson de Moravio. La semajno estas neforgesebla kune kun popoldanco, tre bongusta manĝaĵo, precipe vino kaj biero.“

Stanjo Chrdlová

30-a IIK

Jam sabate vespere oni malfermis la 30-n Internacian Infanan Kongreseton en Parkhotel Rabyně, apud la alloga lago Slapy, 35 km sude de Prago.

Ni bonvenigis 44 infanojn, 12 helpantojn kaj 10 gvidantojn. Infanoj reprezentis 22 landojn. Jen kelke da interesaĵoj el nomaro de gastoj:

- partoprenis knabinoj kaj knaboj preskaŭ en la sama nombro
- la plej granda nombro alvenis el Britio (9)
- la plej longan vojaĝon devis entrepreni 12-jara Daniel el Aŭstralio
- Azion reprezentis infanoj el Japanio, Kazahlando, Koreio
- el Eŭropo ni bonvenigis infanojn de tiuj ĉi landoj: Belgio, Britio, Francio, Germanio, Hungario, Italio, litovio, Nederlando, Norvegio, Portugalio, Rumanio, Rusio, Slovakio, Svedio kaj Svislando.
- el Ĉeĥio partoprenis 5 infanoj - el Brno, Česká Třebová, Trutnov
- la plej junaj partoprenantoj estis du sepjaraj knaboj: Cyril el Svislando kaj Kamil el Slovakio.

Ankaŭ gvidantoj kaj helpantoj prezentis vere internacian stabon, kiu garantiis plenplenan programon de tre diversaj agadoj (sporto kaj ludoj, naĝado, ekskursoj, kantado, dancado, teatrumado, manlaboro...)

Mgr. Vlasta Janáková

JUNULARA PROGRAMO

La junulara programo okazis parte ekster la kongresejo, kutime en la memzorgantejo de sportklub Balkán. Tie trovis lokon la interkona vespero, lingvokurso pri la ĉeĥa, kunsidoj, intelektaj ludoj. La gejunuloj promenis tra Prago, ekkonis bierfarejon „U fleků“, kaj stratojn, kie vivis Kafka, Kisch, Capek, Neruda. La promenon ili finis en gastejo „U medvídků“ per vespermanĝo. Merkrede ili ŝipis al Slapy kaj vendrede ekskursis al la urbo Kutná Hora.

Ankaŭ kulturo ricevis spacon en la programo. Dimanĉe en Rock Café kantis sole por niaj gejunuloj la plej bona ĉeĥa jaz-kantistino Jana Koubková, lunde en klubejo Malostranská beseda prezentis sian ritmoplenan Blusan Vesperon grupo ŠP-band kaj Jericho. Merkrede post la ekskurso en la kulturdomo Dominiva vigligis la junularan vesperon franca grupo JoMo kun brazilano Flávio Fonseca.

En la postkongresaj sabato kaj dimanĉo volontuloj helpis en Kultura-Socia Centro finprepari ĉambrojn por plua agado kaj en karitativa organizo Naděje (Espero) deĵori dum alveno de senhejmuloj.

La gejunuloj estis invititaj al la **8-a Vina seminario** en Dubňany (26/29.09.96) kun prelegoj, gustumado kaj amuza programo (aliĝoj: Jana Burianová, Renneská 35, 639 00 Brno; prezo 360 Kč por ĈEJ-anoj, por aliaj 520 Kč).

Aperis nova kajero de **Pasporta Servo** (50 Kč por ĈEJ-anoj, 95 Kč por aliaj ĉeĥoj). Ĝi havas 128 paĝojn kun

784 gastigantoj el 66 landoj. Skribu al Blanka Gruntová, Vítězná 95, 784 01 Červenka. La kajero havas poŝan formaton, estas kompletigita per mapoj desegnitaj komputile

Pri la kongresejo

La kongreso okazis en la Kongresa Centro (Palaco de Kulturo) de Prago. La tri sesangulaj vestgardejoj ĉe la enirejo estis ŝanĝitaj al 18 giĉetoj (akceptejoj, informejo, TEJO, Afrika agado, poŝto ktp.), ĉe kiuj la kongresanoj ricevis unuajn informojn kaj materialojn. Poste ili povis iri aŭ veturi lifte aŭ eskalatore al supraj etaĝoj kun prelegejoj.

La plej grandaj salonoj ricevis nomojn Zamenhof kaj Lapenna, malpli grandaj Hodler, Drajev, Bácskai, Symons, Lorenc, Pič, Pumpr kaj Vondroušek. En la vestiblo Kaloscay estis aranĝita libroservo. Kvar ĉambroj en la dua etaĝo malantaŭe estis destinitaj por Gazetara Servo, kasisto, estraro de UEA kaj Kongresa Kuriero. Helpis ses komputiloj, du laseraĵoj kaj unu inka printiloj kaj granda kopiilo, kiu dum la tuta semajno faris pli ol cent mil kopiojn.

Vestiblo de la dua etaĝo fariĝis ekspoziciejo de pentraĵoj de Jiří Čelíkovský (Ĉelli), Jaroslav Hradecký, prof. Jiří Hrabec, Stanislav Krájček (Pano), Blanka Zubová, Jindřich Havlík, Rita Rösler-Bucket, Franz-Georg Rösler kaj irana artisto Morteza Habibpur. Apartan ekspozicion havis infanaj desegnoj.

Iom da statistikoj:

Kongresanoj laŭ landoj (sub oblikva streko postaj aliĝintoj): Albanio 2, Algerio 2, Argentino 8/2, Aŭstralio 10, Aŭstrio 27, Belgio 92/4, Bjelorusio 5, Bosnio-Hercegovino 1, Brazilo 52/6, Britio 73/6, Bulgario 35/1, Ĉeĥio 371/8, Ĉinio 21, Danio 41, Estonio 19/3, Etiopio 1, Finnlando 77/1, Francio 214/5, Ganao 3, Germanio 332/12, Greklando 1, Hispanio 65/1, Hungario 64/12, Irano 18/5, Irlando 5, Islando 10, Israelo 26/3, Italio 114/4, Japanio 199/3, Jugoslavio 18, Kanado 7, Kazahio 3, Kolombio 1, Korea Resp. 30, Kostariko 1, Kroatio 31/4, Kubo 6, Latvio 39/1, Lihtenŝtejno 1, Litovio 40/9, Luksemburgio 4, Madagaskaro 1, Makedonio 9, Malajzio 1, Malto 3, Meksikio 2/1, Mongolio 1, Nederlando 132, Norvegio 26, Pakistano 1, Pollando 191/3, Portugalio 7, Rumanio 12, Rusio 85/19, Slovakio 66/1, Slovenio 10, Svedio 96, Svislando 42, Taĝikio 3, Togolando 1/1, Turkio 4, Ukrainio 27/2, Usono 47/1, Venezuelo 3, Vjetnamio 2/1, Forpasintoj 5. Entute: 2837/133 = 2970.

Eŭroparlamentanoj subtenantaj Esperanton (EP-anoj/subtenantoj): Unio Por Eŭropo 54/14, Verduloj 20/5, Eŭropaj Liberaluloj Demokrataj kaj Reformantoj 52/8, Popola Partio Eŭropa (Kristano-Demokrata) 173/20, Partio de la Socialistoj Eŭropaj 217/24, Eŭropa Unuiga Maldekstro 33/2, Eŭropo De la Nacioj 19/1, Ne Enskribitaj 31/1. Entute 626/81.

81-a UK 1996 Prago

Ĵaŭdo, 18 julio

estis tago de alveturantaj helpantoj, tamen jam okazis la unua programero.

La unua gazetara konferenco

Ĝi okazis jam ĵaŭde 18.7. en Klubo de ĵurnalistoj en Praha. Ĉar temis pri ĝeneralaj informoj pri la movado kaj pri la 81-a UK, ĉeestis ĝin ĉefe membroj de la LKK (7 personoj) kaj KKS Nikola Raŝiĉ. En enkonduko skizis la prezidanto de LKK Vlastimil Kočvara staton de la movado en Ĉeĥio kaj reliefigis sencon de Universalaj kongresoj, kun stato de la preparo de la nuna. N. Raŝiĉ akcentis poste specifajn trajtojn de la Praga kongreso kaj samtempe informis aŭskultantojn pri la movado en la mondo.

Sekvis vigla diskuto kun ĉiuj 16 partoprenintaj ĵurnalistoj, kiuj metis multajn demandojn. Respondis ilin kelkaj respondecaj LKK-anoj. Fine la Radio Vox (Praha) kaj la televido Premiera aparte intervjuis la prezidanton de LKK.

Sabato, 20 julio

Je la 8-a matene ekvivis la kongreseja vestiblo pro alveturantaj kongresanoj. Je la 9-a komenciĝis akceptado ĉe pluraj ĝiĉetoj. Ĉiuj ricevis kongresajn doku-

mentojn. Malgraŭ granda nombro de la partoprenantoj ĉio pasis kun ridetoj kaj amikaj salutoj. En la unua etaĝo ekfunkciis libroservo ne nur kun libroj, sed ankaŭ kun kazetoj.

Estis instalita **rendevua tabulo**, ege ŝatata kaj elserĉata de kongresanoj ĉiam en kongresoj. Ĝi ĉiam promesas ligi bonajn kontaktojn kaj fidelajn amikecojn.

En la salono Hodler je 9.30 okazis unua **Seminario pri lingvopolitiko**, gvidata de dr-o Detlev Blanke el Germanujo.

Internacia infana kongreseto. 44 infanoj de 22 landoj, Esperante parolantaj, 7 - 15 jaraĵ, forveturis al sia kongreseto en Rabyně apud Slapy. Kongreseton gvidas prof. Christopher Fettes (Irlando), profesoro el Dublino, Ĉeĥa gvidantino estas Mgr. Vlasta Janáková.

Vespere en la vestibloj de la dua kaj tria etaĝoj ĉiuj amuziĝis ĉe la **interkona vespero**, kies parto estis ankaŭ tombolo.

Dimanĉo, 21 julio

Solena inaŭguro

Ĉirkaŭ la 10-a horo antaŭtagmeze komencis kolektiĝi la kongresanoj en la granda salonego Zamenhof kaj je la 10.20 horo la prezidanto de UEA Lee Chong-Yeong povis inaŭguri la kongreson per enkondukaj vortoj. Li rememoris, ke lastfoje Prago gastigis Universalan Kongreson antaŭ 75 jaroj post la unua mondmilito. La ĉijara kongreso trovis konvenan lokon en Prago, kiam

nia movado festas centjarigon de la unua teatra prezentado en Esperanto, ĉar la kongreso okazas sub aŭspicio de Lia Moŝto, prezidento de Ĉeĥa Respubliko, Václav Havel, kiu estas fama dramverkisto.

Sekvis salutoj de la LKK-prezidanto kaj ĈEA-prezidanto Vlastimil Kočvara kaj vicurbestro de Prago s-ro Drábek, kiu esprimis esperon, ke nia kongreso gravuriĝos por ĉiam en la historion de Prago.

Mark Fettes prezentis gastojn, ambasadorojn de Litovio, Slovenio, Ukrainio, Argentino, Koreio kaj Italio kaj membrojn de la Honora Komitato. Poste la UEA-prezidanto prezentis la kongresan estraron.

Mark Fettes denove revenis al la jaro 1921, kiam dum la 13-a UK aktivis eminenta japana diplomato, la Asista Ĝenerala Sekretario de Ligo de Nacioj, s-ro Inazo Nitobe, kiu poste tre favore raportis pri Esperanto.

Pluraj eminentuloj sendis al nia kongreso siajn salutojn kaj mesaĝojn, kiuj estis tralegitaj. Temas pri Václav Havel, prezidento de Ĉeĥa Respubliko, Boutros Boutros-Ghali, Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, Federico Mayor, Ĝenerala Direktoro de Unesko, kaj kardinalo Miloslav Vlk, ĉefepiskopo de Prago.

Post violona interludo kun komponaĵo Raduzo kaj Mahulena de la ĉeĥa komponisto Josef Suk, kiun prezentis violonisto Jan Duda kaj pianisto Jan Zimmer, skizis Ĵak de Puil la kongresan temon: "Kulturo - ĉu valoro aŭ varo?" S-ino Michela Lipari invitis la kongresanojn al

multegaj prelegoj kaj kursoj, kiujn la kongreso proponas por tiu ĉi semajno.

Bulgara teatra grupo ĝuigis la salonegon per sia fragmento el teatraĵo "La unua brandfaristo" de Leo Tolstoj, kio estis la jam aludita unua teatraĵo en Esperanto antaŭ cent jaroj.

Mark Fettes tralegis novan dokumenton, Manifeston de Prago, kies tekston ni publikigas aliloke, kaj petis ĉiujn samideanojn subskribi la manifeston, kiu estos je dispono en la ĝicetoj.

Tre solena momento de la inaŭguro estis proklamo de kvin novaj Honoraj Membroj de UEA:

- s-ino Marie Bartovská, Ĉeĥio
- s-ro Zef Mjeda, Albanio
- s-ino Eli Urbanová, Ĉeĥio
- s-ino Belka Beleva, Bulgario
- s-ino Eva Seemannov, Ĉeĥio

Belan saluton sendis al la kongreso d-ro Luis Zamenhof-Zaleski, nepo de la Majstro.

La prezidanto de UEA, s-ro Lee Chong-Yeong, substrekiis en sia ĉefa parolado la demokratian karakteron de Esperanto-movado, kiu klopodas helpi al lingve malfortaj nacioj kaj konservi ĉies lingvojn sub devizo „unueco en divers-eco.“

Reprezentanto de TEJO salutis la kongreson en la nomo de junularo kaj prezentis novan eldonon de kajero Pasporta Servo.

Sekvis preskaŭ kvindeko da landaj reprezentantoj kun salutoj en la nomo de siaj landaj asocioj. Reprezentanto de Kamerunio ne povis veni, ĉar dumvoje sur ŝipo li estis forkaptita de fremdaj soldatoj. Nove aliĝinta asocio estis la

vjetnama.

La solenan inaŭguron finis la himno La Espero.

Salutletero de la prezidento de Ĉeĥa Respubliko.

Estimataj geamikoj,

permesu al mi saluti la 81-an Universalan Kongreson de Esperanto, kies celo - la klopodo pri reciproka interkompreniĝo inter membroj de diversaj nacioj kaj kulturoj - estas por mi aparte proksima. Similaj temoj, kiel tiu, min ĉiam interesis.

Mi kredas, ke viaj traktadoj helpos krei kampon de reciproka kompreno, aktiva agado kaj respekto kaj tiel formi instigan medion, kiu povus ŝovi la homaron pli al ideala celo: kunvivado de ĉiuj en paco kaj harmonio.

Mi deziras al via kongreso bonan atmosferon.

Václav Havel

Novaj Honoraj Membroj de UEA

Marie BARTOVSKÁ (1912), Ĉeĥio,

sopiris iĝi instruistino, sed pro miopeco la lernejo rifuzis ŝin. Ŝi eklaboris en tolaj-fabriko, sed poste ŝi sukcesis eniri komercan lernejon. Esperanton ŝi lernis en la 30-aj jaroj. Ŝi aktivis en kluboj de pluraj lokoj, ĝis ŝi en 1951 fondis klubon en Frýdek-Místek, kiun ŝi motoras ĝis nun. Ŝi multe instruis kaj en 1965 ŝi iniciatis ĉiumonatan Kafejo Esperanta,

kiun ŝi plu gvidas. Laborinte en teksaj-fabriko, ŝi spertiĝis pri tiufaka terminologio kaj kontribuis i.a. al PIV. Konata aktivulino en sia lando, longtempa delegitino de UEA, honora membrino de ĈEA. Ŝi ne okupis centran movadan postenon, sed ŝi estas modelo de tutviva sindediĉo al lingvo, kiu farigis universitato de ŝia vivo vivo. Al ŝiaj aktivecoj apartenas ankaŭ tradukado (*Problemoj en Panonio* de Achille Gregor, *Malliberulo de la prezidento* de Vladimír Škutina, *Nigraj baronoj* de Miloslav Švandrlík, *Danjo* de Karel Čapek, ankoraŭ ne eldonitaj).

Belka BELEVA (1927), Bulgario,

esperantistiĝis en 1957. Profesia aktorino, kunfondinto de Bulgara Esperanto-Teatro. Ekde la unua prezentado de BET en 1958 Beleva aktivis sur la Esperanta teatra scenejo seninterrompe ĝis nun. Krom en BET, ŝi partoprenis ankaŭ en Internacia Arta Teatro. Ŝi aktoris en dek naciaj kongresoj de Bulgara E-Asocio, dek kvin Universalaj Kongresoj, kvar IFEF-kongresoj, tri IJK-oj, naŭ festivaloj de E-teatro kaj multaj aliaj lokaj kaj internaciaj aranĝoj. Ŝi estis prezidanto de Sofia E-Societo (1979-1981), prezidanto de la Virina Komisiono de BEA (1975-1986) kaj membro de la Virina Komisiono de UEA (1978-1982). De 1967 ŝi voĉlegas la revuon *Bulgara Esperantisto* por blinduloj. En 1986 aperis ŝia aŭtobiografio Teatro sen lingva barero.

Zef Luigi MJEDA (1921), Albanio

profesia instruisto, kiu laboris ankaŭ kiel ĉiĉerono, kio kontaktigis lin en 1959 kun la vjetnama ambasadoro Nguyen Van Kinh. Tiu entuziasmigis lin pri Esperanto, al kiu Mjeda poste plene dediĉis sin. Li multe korespondis, sed kiam tio iĝis malebla, li verkis, tradukis, kompilis vortarojn kaj kaŝe instruis la lingvon al parencoj kaj geamikoj. En 1967 li estis arestita sub absurdaj pretekstoj. Naŭ jarojn li punlaboris en tabakfabriko. Li restis fidela al Esperanto en cirkonstancoj de plej severa diktaturo, kiu persekutis esperantistojn. Post la demokratiigo li disvolvis grand-skalan aktivadon, ĉefe en intelektulaj kaj religiaj medioj. En 1994 aperis liaj lernolibro kaj vortaro. Delegito de UEA, aktiva membro de IKUE kaj KELL.

Eva SEEMANNOVÁ (1920), Ĉeĥio

profesia aktorino, kiu post kariero en migranta teatro kaj Pragaj teatroj fariĝis tutlande konata prezentanto de unu-aktoraj teatraĵoj. Esperantistiĝis en 1949. Gvidis Cseh-kursojn en multaj lokoj kaj someraj E-kolegioj. En 1954 ŝi fondis, inspirite de Julio Baghy, la trupon „Verda ĉaro de Julio Baghy“, kies plej granda sukceso estis Pigmaliono de G. B. Shaw, prezentita i.a. en la Varsovia UK en 1959. Famaj plenumoj estis *Legendo pri amo* de Nazim Hikmet, kiu mem ĉeestis la premieron, *Patrino* de K. Čapek, *Nora* de H. Ibsen kaj *Maryša* de fratoj Mrštík. Ŝi mem tradukis dramojn por la trupo, kaj ĉefrolis en ĉiu el ili. Post ĝia disfalo ŝi revenis al unu-

aktoraroj, kiujn ŝi prezentas ĝis nun. En E-gazetoj aperis ŝiaj poemoj, el kiuj du troviĝas en Esperanta antologio.

Eli URBANOVÁ (1922), Ĉeĥio

instruistino, kiu esperantistiĝis en 1948 kaj en 1950 provis unuajn versaĵojn en Esperanto. Amikiĝo kun Julio Baghy en 1952 donis veran impulson al ŝia verkado. Dekfoje ŝi premiĝis en diversaj literaturaj konkursoj. Ŝiaj poemoj aperis en E-gazetoj dise tra la mondo. Ŝi aktive partoprenis verkistajn societojn kaj membris en la juĝkomisiono de la Belartaj Konkursoj de UEA. Ŝi aperigis kvar poemarojn: *Nur tri koloroj* (1960), *El subaj fontoj* (1981), *Verso kaj larmo* (1986) kaj *Vino, viroj kaj kanto* (1995). Ŝia literatura ĉefverko tamen estas *Hetajro dancas*, ampleksa aŭtobiografia romano (1995). Ŝi multe artikolis pri Esperanto en la ĉeĥa kaj instruis. Membro de la Praga E-Klubo ekde 1949, honora membro de ĈEA (1982) kaj membro de la Akademio de Esperanto (1986). Gustumu el ŝia arto:

ROZO

Rozo strange rava
en ĝardeno kreskis:
Kiun ajn mi pensis,
ĝi fermita restis.

Jen vin unusolan
mi nur rememoris -
kaj en la ĝardeno
rozo tuj ekfloris.

Manifesto de Prago

de la movado por la internacia lingvo
Esperanto

Ni, anoj de la tutmonda movado por la progresigo de Esperanto, *direktas* ĉi tiun manifeston al ĉiuj registaroj, internaciaj organizoj, kaj homoj de bona volo, *deklaras* nian intencon firmvole plulabori por la celoj ĉi tie esprimitaj, kaj *invitas* ĉiun unuopan organizaĵon kaj homon aliĝi al nia strebado.

Lanĉita en 1887 kiel projekto de help-lingvo por internacia komunikado, kaj rapide evoluinta en vivoplenan, nuancorican lingvon, Esperanto jam de pli ol jarcento funkcias por kunligi homojn trans lingvaj kaj kulturaj baroj. Inter-tempe la celoj de ĝiaj parolantoj ne perdis gravecon kaj aktualecon. Nek la tutmonda uzado de kelkaj naciaj lingvoj, nek progresoj en la komunikad-tekniko, nek la malkovro de novaj metodoj de lingvo-instruado verŝajne realigos jenajn principojn, kiujn ni konsideras esencaj por justa kaj efika lingva ordo.

1. Demokratio. Komunika sistemo, kiu tutvive privilegias iujn homojn, sed postulas de aliaj, ke ili investu jarojn da penoj por atingi malpli altan gradon de kapablo, estas fundamente maldemokratia. Kvankam, kiel ĉiu lingvo, Esperanto ne estas perfekta, ĝi ege superas ĉiun rivalon en la sfero de egaleca tutmonda komunikado.

Ni asertas, ke lingva malegaleco sekvi-

gas komunikan malegalecon je ĉiuj niveloj, inkluzive de la internacia nivelo. Ni estas movado por demokratia komunikado.

2. Transnacia edukado. Ĉiu etna lingvo estas ligita al difinita kulturo kaj naci(ar)o. Ekzemple la lerneĵano, kiu studas la anglan, lernas pri la kulturo, geografio kaj politiko de la angla-lingvaj landoj, precipe Usono kaj Britio. La lerneĵano, kiu studas Esperanton, lernas pri mondo sen limoj, en kiu ĉiu lando prezentiĝas kiel hejmo.

Ni asertas, ke la edukado per iu ajn etna lingvo estas ligita al difinita perspektivo pri la mondo. Ni estas movado por transnacia edukado.

3. Pedagogia efikeco. Nur malgranda procentaĵo el tiuj, kiuj studas fremdan lingvon, ekmastras ĝin. Plena posedo de Esperanto eblas eĉ per memstudado. Diversaj studoj raportis propedeŭtikajn efikojn al la lernado de aliaj lingvoj. Oni ankaŭ rekomendas Esperanton kiel kernan eron en kursoj por la lingva konsciigo de lernantoj.

Ni asertas, ke la malfacileco de la etnaj lingvoj ĉiam prezentos obstaklon por multaj lernantoj, kiuj tamen profitus el la scio de dua lingvo. Ni estas movado por efika lingvoinstruado.

4. Plurlingveco. La Esperanto-komunumo estas unu el malmultaj mondskalaj lingvo-komunumoj, kies parolantoj estas senescepte du- aŭ plurlingvaj. Ĉiu komunumano akceptis la taskon lerni almenaŭ unu fremdan lingvon ĝis parola

grado. Multokaze tio kondukas al la scio de kaj amo al pluraj lingvoj kaj ĝenerale al pli vasta persona horizonto.

Ni asertas ke la anoj de ĉiuj lingvoj, grandaj kaj malgrandaj, devus disponi pri reala ŝanco por alproprigi duan lingvon ĝis alta komunika nivelo. Ni estas movado por la provizo de tiu ŝanco.

5. Lingvaj rajtoj. La malegala disdivido de potenco inter la lingvoj estas recepto por konstanta lingva malsekureco, aŭ rekta lingva subpremado, ĉe granda parto de la monda loĝantaro. En la Esperanto-komunumo, la anoj de lingvoj grandaj kaj malgrandaj, oficialaj kaj neoficialaj, kunvenas sur neŭtrala tereno, dank' al la reciproka volo kompromisi. Tia ekvilibro inter lingvaj rajtoj kaj respondecoj liveras precedencan por evoluigi kaj pritaksi aliajn solvojn al la lingva malegaleco kaj lingvaj konfliktoj.

Ni asertas, ke la vastaj potenco-diferencoj inter la lingvoj subfosas la garantiojn, esprimatajn en tiom da internaciaj dokumentoj, de egaleca traktado sendistinge pri la lingvo. Ni estas movado por lingvaj rajtoj.

6. Lingva diverseco. La naciaj registaroj emas konsideri la grandan diversecon de lingvoj en la mondo kiel baron al komunikado kaj evoluigo. Por la Esperanto-komunumo, tamen, la lingva diverseco estas konstanta kaj nemalhavebla fonto de riĉeco. Sekve, ĉiu lingvo, kiel ĉiu vivajospicio, estas valora jam pro si mem kaj inda je protektado

kaj subtenado.

Ni asertas ke la politiko de komunikado kaj evoluigo, se ĝi ne estas bazita sur respekto al kaj subteno de ĉiuj lingvoj, kondamnas al formorto la plimulton de la lingvoj de la mondo. Ni estas movado por lingva diverseco.

7. Homa emancipiĝo. Ĉiu lingvo liberigas kaj malliberigas siajn anojn, dante al ili la povon komuniki inter si, barante la komunikadon kun aliaj. Plani kiel universala komunikilo, Esperanto estas unu el la grandaj funkciantaj projektoj de la homa emancipiĝo - projekto por ebligi al ĉiu homo partopreni kiel individuo en la homara komunumo, kun firmaj radikoj ĉe sia loka kultura kaj lingva identeco, sed ne limigita de ili.

Ni asertas ke la ekskluziva uzado de naciaj lingvoj neeviteble starigas barojn al la liberecoj de sinesprimado, komunikado kaj asociiĝo. Ni estas movado por la homa emancipiĝo.

Internacia Kongresa Universitato

estis inaŭgurita je la 14-a horo. Rektoro de IKU, prof. RNDr. Vlastimil Novobilský, CSc, prezentis naŭ prelegontojn kaj iliajn temojn.

La unua estis Nobel-premiito pri ekonomio (1994), prof. Reinhard Selten, kiu prelegis pri sia ludo-teorio. Prof. Selten esperantistiĝis en 1946 kaj estas dumviva membro de UEA. En sia prelego li klarigis, ke ludo-teorio matematike modeligas kaj analizas konfliktajn

situaciojn inter kunlaborantoj kaj helpas trovi la plej saĝajn solvojn kaj decidojn. En ĉiu konflikto aŭ kunlaboro la homoj agas kiel ludantoj en ludo, kies optimuma solvo estas trovebla matematike.

Li prezentis ekzemplon pri du ŝtelistoj fermitaj ĉiu en izola ĉelo. Ili ne scias, ĉu la kamarado konfesos la krimon aŭ ne. Se konfesos ambaŭ, ili ricevos 5-jaran punon. Se ambaŭ ne konfesos, ili ricevos po 2 jaroj. Se nur unu konfesos, li ricevos 1 jaron kaj la alia 10 jarojn. Ĉu konfesi aŭ ne?

Unuavide ŝajnas pli avantaĝe ne konfesi, sed matematika analizo pruvas malon: konfesanto esperas je 1 jaro kaj riskas 5 jarojn, dum nekonfesanto esperas nur je 2 jaroj kaj riskas eĉ 10.

Li atentigis, ke la ludo-teorio ne traktas, kiel gajni ludante ruleton aŭ pokeron, kaj ankaŭ ne konsilas kiel riĉiĝi per borsa spekulado.

Ĝi utilas por aplikoj en ekonomio, politiko, milita scienco kaj biologia evolu-teorio. Racia kooperado ne eblas ekster ekvilibro, sed trovi ekvilibron en iuj ludoj estas tre malfacile.

Ni notis ankoraŭ jenajn interesajn frazojn:

"Homaj kapabloj de pensado kaj kalkulado ne estas senlimaj, tial homa racieco estas limigita."

"Homaj motivoj estas malpli memcentritaj ol oni kutime supozas en ekonomiaj teorioj."

TADEN

Tutmonda Agado de Esperantistoj
Nefumantoj havis sian unuan kunvenon.

Poŝtistoj kaj telekomunikistoj kunvenis

La 26-an ĉefkunvenon de la Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio (IPTEA) prezidis la prezidanto de IPTEA s-ro Draguŝko Petrov el Bulgario kaj partoprenis ĝin 18 personoj el 8 landoj. Prezidanto, s-ano Petrov, parolis pri la 30-jara historio de IPTEA. Dipl. ing. Veikko Mki prelegis pri poŝtaj kaj telekomunikaj servoj en Finnlando. Okazis ankaŭ vigla disputo pri la du vortaroj de la telekomunika terminaro. Poste estis kiel nova prezidanto de IPTEA elektita la ĝisnuna vicprezidanto, dipl. ing. Veikko Mki.

Ekumena Diservo en Esperanto

okazis je 16.30 en la preĝejo de Bohem-frata eklezio evangelia ĉe Salvatoro en la Malnova Urbo. En tute plenigita preĝejo gvidis la Diservon kun servado de la Sankta Vespermanĝo la evangelia paroĥestro Gerrit Berveling el Nederlando kaj romkatolika pastro Albrecht Kronenberger el Germanio. La ĉeestantoj de ĉiuj naciecoj komune kantis en Esperanto laŭ disdonitaj tekstoj. La ekumanan Diservon prizorgis la ĉefa sekcio de KELI sub gvido de Pavel Polnický.

Fondiĝis la Asocio de Sociallaboristoj Esperantistaj - ASLE

Al la celoj apartenas i.a. la intersanĝo de spertoj inter tiuj, kiuj laboras en la vasta sociala kampo kaj la disvastigo de Esperanto inter iliaj kolegoj.

Lundo, 22 julio - tago de la libro

LIBROJ DE LA JARO (beletro)

Ĉi tiu arango en la pasinta UK estis tiom sukcesa, ke ĉi-jare ĝi devis disdungi al du prezentoj: beletra (lunde, 9 - 10.30) kaj cetera (marde, 16 - 17.00h Drajev).

Resumoj de enhavoj, legado de fragmentoj kaj eĉ anekdotoj eldonistaj intersekvis dense en la lundaj, beletraj 90 minutoj.

Ĉina E-Eldonejo alportis la unuan volumon de la grandioza ĉina romano **RUGDOMA SONGO**, kiu post la apero de la kompleto, estos la plej ampleksa beletra traduko iam ajn aperinta E-lingve.

Impeto (Moskvo) prezentis, voĉe de Andreo Pettyn, fragmenton de la utopia, soci-kritika romano **ARDES** de B. Tomado (pseŭdonomo de Boris Tokarev, † 1994), amare amuzan.

La loka „skipo“ **KAVA-PECH** premierigis la mondkonatan dramon **AŬDIENCO** de Václav Havel, 17 rakontojn de Franz Kafka en aparte fidela traduko de V. Lutermano kaj la poemaron **PEZA VINO** de Eli Urbánová.

Eĉ **Fonto** (Brazilo) publikigis la ĉeĥan poetinon (**VINO, VIROJ KAJ KANTO**) en unu el siaj freŝaj beletraj kajeroj. Alia ĉeĥaĵo el Brazilo estas bela reeldono de **BAPTO DE CARO VLADIMIRO** de Karel Havlíček Borovský, fama traduko de Pumpr.

Sezonoj (Rusio) ne konsentas pri degenero de librokulturo, almenaŭ en

Esperantujo: la libroj, kiujn ĝi prezentis pasintjare, jam elĉerpigis. Tia sorto certe trafos la novaĵojn. **PRINCIDINO MARY** (Lermontov), **KVARTETO** (kvar poetoj originalaj), **LA NASKIĜO DE LA RUST-IMUNA ŜTALRADO**, sciencfikcia romano de la mondkonata, esperantista Harry Harrison (kiu ĉeestas la UK-on), kaj **LA DU TUREGOJ**, dua volumo de la Tolkien-a **LA KUNULARO DE L'RINGO**, el kiu laŭtlegis la tradukinto, William Auld.

La **Kancerkliniko** (Francio) estas ne nur revuo, sed eĉ eldonejo!

Edistudio (Italio) alvenas kun reeldono de **OMBRO SUR INTERNA PEJZAĜO**, furora romano de Spomenka Štítnice, **STOKITA VINO**, rakontaro de Poul Thorsen, kaj **Kafka** - volumo tradukita de Mauro Nervi.

Verkisto Manuel de Seabra (Barcelono) mem prezentis sian romanon **LA ARMEJOJ DE PALUZIE** (Vieno: **Pro Esperanto**), kiun li juĝas la plej bela el siaj multaj libroj, aperintaj en diversaj lingvoj.

Fine, Andreo Pettyn anoncis pri beletraĵoj aperintaj kaj aperontaj sur sonkasedo, zorge de Pola Asocio de Nevidantoj (i.a. **LA FARAONO** de Prus kaj **QUO VADIS?** de Sienkiewicz).

-IE-

Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno jam ekde 1990 katalogigas siajn librojn rekte en la biblioteka komputila sistemo. La elektronika katalogo estas parto de la sistemo de la Aŭstria Nacia Biblioteko kaj tiel konsultebla per **INTERRETO** en la tuta mondo (mayer@grill.onb.ac.at).

Belartaj konkursoj de UEA

POEZIO: 1. ne aljuĝita; 2. *En stacidomo* de Mauro Nervi, Italio; 3. *Veraj koloroj* de Anatole Tars Lubovich, Usono. Honora mencio: *Don Juan Tenorio* de Mauro Nervi. Partoprenis 50 poemoj de 22 aŭtoroj el 16 landoj.

PROZO: 1. ne aljuĝita; 2. *Bonan matenon!* de Sten Johansson, Svedio; 3. *Nokta halto* de Sten Johansson kaj *La pluŝa kato* de Cristina de'Giorgi, Italio. Partoprenis 26 verkoj de 18 aŭtoroj el 11 landoj.

TEATRAĴOJ: 1. na aljuĝita; 2. *La ruĝaj formikoj* de Georges Lagrange, Francio; 3. *Nepo benita* de Sten Johansson, Svedio. Partoprenis 11 teatraĵoj de 9 aŭtoroj el 6 landoj.

ESEO: Premio Luigi Minnaja: *...strebad' iel valoras eĉ en duongrad'* de Olle Hällefors, Svedio; 2. *Plurlingvismo kaj unulingvismo en Eŭropo tra la jarcentoj* de Gian Carlo Fighiera, Italio; 3. *La ĉeĥa literaturo en la spegulo de la Esperantaj tradukoj* de Oldich Knchal, Hungario. Partoprenis 8 eseoj de 7 aŭtoroj el 5 landoj.

KANTO: Premio An Song-san: *Tiu ĉi* de Tarcsto Jos de Lima, Brazilo; 2. *Io lanta* de Tarczio Jos de Lima; 3. *Ho mia land'* de Fiorello Fiorentin, teksto, kaj Aldo Fiorentin, muziko, Italio; kaj *Hej! Hipopotamo* de Mike Sadler, Hungario. Partoprenis 8 kantoj de 4 aŭtoroj aŭ aŭtoraj duopoj el 4 landoj.

INFANLIBRO DE LA JARO 1995: *La infanoj en la arboj* de Gudrun Pausewang, tradukita de Nora Caragea,

eldonita de Inter-Kulturo, Slovenio. Partoprenis 4 libroj de 4 eldonejoj el 4 landoj.

Aŭtoraj duonhoroj

En Libroservo antaŭtagmeze renkontiĝis kun siaj legantoj William Auld, kies traduko de la dua volumo de Tolkien *Kunularo de l' ringo* ĵus aperis en la eldonejo Sezono. La skota poeto estas konata pro sia jam klasika poemo *Infana raso*, plue kiel kompilinto de *Nova fundamenta krestomatio* kaj precipe pro sia internacia lernolibro *Paŝoj al plena posedo*.

Posttagmeze atingis pintajn momentojn de kortuŝo la kroata aŭtorino Spomenka Ŝtimec. La verkistino estas konata kiel rakontisto de amoj kaj disiĝoj, vojaĝoj kaj dummilitaj spertoj - ĉio nedisigeble ligita al Esperantujo, kie ŝi hejmas. La lastan parton de sia prezentado Spomenka dediĉis al sia lasta verko, „Tena“, kiu portretas per la figuro de ŝia avino Mezeŭropon tra nia jarcento. Fine de sia parolado, kiun atente sekvis pli ol 50 aŭskultantoj, la verkistino aŭtografis siajn verkojn.

BAHAANOJ KUNSIDIS:

Lunde en salono Pumpr fratece kunsidis ĉirkaŭ 70 homoj por debati kun B.E.L. kiel antaŭenigi daŭre prosperantan kulturon. Per ekzemploj de protektado kaj kultivado de la kultura heredaĵo laŭ la principo "Unueco en Diverseco". S-ino Otto rakontis pri la lukto de bahaaj indianoj en Panamo kontraŭ "Koka-Kolismo" por savi sian kulturon.

S-ino Schouten-Boys priskribis la klopodojn de la Bahaa Asocio por la Artoj por vivigi riĉan kaj buntan kulturon de la homaro interalie per Esperanto. Poste okazis diskuto por provi difini, ĉu kulturo estas valoro aŭ varo. La Aŭstraliaj aborigenoj montras al ni, ke kulturo povas esti preskaŭ sen varoj kaj ke misuzataj varoj povas mortigi la esencajn valorojn. Sed la homaro de longe ne plu vivas en la praa ŝtonepoko: Ĝi bezonas varojn, sed tiuj varoj nepre devas resti valoraj. Tiel diris Baŭf'u'ln' (fondinto de la Bahaa kredo) dum la dua parto de la 19a jarcento: la problemoj de la homaro estu solvitaj nur per unueco kaj per "spiritaĵ", kulturaj rimedoj.

Fakkunsido de Oomoto

allogis proksimume 650 kongresanojn al la salono Lapenna lundon matene - nombro kiu egalas al la rekordo farita en la jubilea kongreso en Varsovio. Trideko da oomotanoj kaj amikoj prezentis ekrigardon al japana kulturo kaj la agado kaj pensoj de la japana religia organizo Oomoto.

Ĉeestantoj povis sperteti oomotan meditadoŝanĝon por kvietigi kaj koncentri la animon, kaj spekti no-dancon, popolkanton kaj magion. Kelkaj eĉ povis gustumi japanan verdan ceremonian teon. La nova direktoro de EPA (Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto), DEGUĈI Masato, parolis pri siaj spertoj kaj pensoj rilate al la kongresa temo.

Speciala gasto el la ne-Esperanta mondo, James P. Morton, Dekano de la

Katedralo de Sankta Johano la Teologo en Novjorko, Usono, parolis pri sia sperto dum 21 jaroj kunlabori kun Oomoto en interreligia kaj ekologia agado. Tion li rilatigis al la agado de Esperanto, kion li unuafoje spertas ĉi tie en la Praga UK. Li planas starigi tute novan centron en Novjorko por interreligia agado. Temas pri konstanta loko kie ĉiaj religioj povu kunlabori por komunaj celoj, prezenti sin al la mondo, kaj aranĝi komunajn eventojn.

Jarkunveno de

Muzika Esperanto-Ligo

Prezidis prof. Dimitar Terziev el Bulgario. Ne eblis elekti la tutan estraron, sed la membraro ĝojas, ke s-ro David Gaines, komponisto de Usono, konsentis esti prezidanto kaj ekde nun transpreni la eldonadon de "Muziko". Menciindas, ke baldaŭ aperos kantantologio. MEL kotizo por 1996/97 estas 15 USD.

Internacia Esperanto-Horo, ekzistas jam 16 jarojn. Fondis ĝin entuziasma muzikisto prof. Dimitar Terziev, bulgara muzika pedagogo, direktisto kaj komponisto. La horo, simile kiel la mita birdo Fenikso, renaskiĝas ĉiam dum la Universala Kongreso, konsistante el la kongresanoj mem. Nova horo ekzercis matene kaj posttagmeze kaj prezentis sin vendrede dum la Internacia Arta Vespero.

Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEĴA)

Lunde kunvenis 45 personoj, el kiuj 23 membroj. Prezidanto Stefan Maul atentigis pri kriza financa stato, pro kiu

„Internacia Ĵurnalistoj” devos esti reduktita je kelkaj paĝoj, por ke ĝi fariĝu malpli kosta. Aliflanke estas kuraĝiga eksploda populariĝo de korespondaj kursoj, kiu montris malsufiĉon da docentoj kaj sekvigis „malsukceson pro tro granda sukceso”. Kompilata estas ĵurnalisma terminaro de Aleksandro Korĵenkov. Laborgrupo esploras eblojn de movadaj informoj per elektronika reto.

Helpo por redaktoroj. Por la unua fojo UEA-estranino Michaela Lipari aparte invitis redaktorojn por diskuti kiel UEA povas helpi al ili. Leviĝis pluraj demandoj kaj petoj pri aktualaj informoj kaj fotoj. Konkretiĝis plano, ellabori strukturon de estonta inform-agentejo movada, en kiu kunlaboros UEA kaj TEĴA.

Ne plu estu kolizio de E-araĝoj! Ĉu vi organizas E-araĝon kaj ne volas kolizii kun aliaj? Aŭ ĉu vi serĉas aktualan liston de E-araĝoj por partopreni? Ekde printempo la Budepeŝta Esperanto-Oficejo prizorgas la kompiladon de “Plena listo de E-araĝoj” (dato, temo, adresoj, retligoj), - kiu estas aktuala ne nur en la momento de pretigo, sed daŭre, dusemajne estas aktualigata - kaj konsulteblas senpage! Se vi organizas E-renkontiĝon (lokan, fakan, internacian ktp.) sendu la datumojn al pk 87, H-1675 Budapeŝto, Hungario, fakse +36-1-2828885, rete: eventoj@odin.net. Antaŭ ol vi decidus pri la dato, vi povas peti informon pri la “libereco/okupiteco” de via planita dato! La tuta listo estas konsultebla per Internet ĉe la adreso: www.odin.net/esperanto/ -kaj aperas po monatoj en la gazeto Eventoj, kie vi

povas ricevi ankaŭ pliajn informojn.

Litova stelo. En salono Drajev kolektiĝis ĉ. kvardek interesiĝantoj pri la gazeto, kies specimenon ĉiu kongresano trovis en sia saketo. La redaktoro rakontis pri celoj kaj temaro de la revuo, pri ĝia lingvaĵo kaj deziroj.

Kunveno de vegetaranoj (TEVA). Prezidis ĝin la prezidanto s-ro Christopher Fettes. Post varma bonveno al la ĉeestantoj (70) s-ro Fettes proponis pli aktivan agadon per novaj kontaktpunktoj; li informis, ke la aktualigita Statuto, aprobita de la Membroj, ricevas aprobon de la Estraro. Vic-prezidanto s-ro Simcock prelegis pri la bovina sponĝiforma enĉelopatio, kaj sekvis komentarioj kaj sugestoj.

Speciala oferto - senpaga libro. Espero por la mondo: spirita galvanoplastiko (aŭ: Kiel plibonigi la rilatojn inter viroj kaj virinoj). Tiuj, kiuj ne povas aĉeti tiun libron de O. M. Advanhov, ricevos ĝin senpage por ilia E-grupo aŭ E-biblioteko. Donu adreson rekte al Eldonejo PROSVETA, CH-1808 Monts-de-Corsier, Svislando.

Azia agado.

La 22-an de julio sinsekve okazis kunsidoj rilate al la azia agado. Matene, post la privata kunsido de komisiano pri Azia Esperanto-Movado por sia fermita kunsido kolektiĝis reprezentantoj de 4 landaj asocioj: el Ĉinio, Koreio, Japanio kaj Vjetnamio.

Postagmeze okazis publika kunsido pri

azia agado kun la ĉeesto de ĉ. 40 personoj el 13 landoj. La raportoj kaj diskutoj en la kunsido reale reflektis la nunan situacion de esperanto-movado en aziaj landoj kaj pozitive rezultis precipe por la Azia Esperanto-Kongreso en Ŝanhajo, Ĉinio, en la 22 - 25-a de aŭgusto.

TAKEUTI Yosikazu

Marjorie Boulton pri sorĉistinoj

En la dua prelego de IKU d-ino M. Boulton parolis pri magio kaj pri persekutado de senkulpaj virinoj dum jarcentoj. La prelego vekis preskaŭ ŝokan intereson inter la kongresanoj.

Ĉeĥaj artistoj al la 81-a UK

Apud operkantistoj, konataj jam inter esperantistoj (Miroslav Smyčka, Josef Vich, Václav Halff, Helena Halffrová-Supová), kaj same famaj violonisto Jan Duda kaj klarinetistino Bohuslava Šrutová aperis junaj artistoj Tomáš Fiala (tenoro), Ema Hubáčková (soprano) kaj Alžběta Rablová (alda violono). Sed ankaŭ amatoroj koncertis: Štěpánka Rousková-Poulová (kanto), kaj Zuzanka Urbanová (Violono), 11-jara laŭreatino de muzikaj konkursoj por junularo. La aŭskultantoj ĝuis verkojn de grandaj komponistoj (Dvořák, Smetana, Suk, Mozart, Verdi, Schubert, Puccini, Weber, Moniuzsko, Godard, Marcello) en Esperanta vesto, sed ankaŭ teneran Lulkanton de nia pedagogo Jan Amos Komenio (17a jc.). Speciale interesa programero estis kantoj komponitaj de ĉeĥa esperantisto Lubomír Huf laŭ poemoj de bulgaraj esperantistaj poetoj

Dimitro Denĉev kaj Penka Batoeva, kiujn kantis per sia nature agrabla voĉo Štěpánka Rousková-Poulová.

„Mi, Eliza Premislidino, reĝino de Bohemio“ estas titolo de teatraĵo laŭ novelo de Miloš Václav Kratochvíl el la libro „Reĝaj amoj“, kiun dramigis Ĉestmír Vidman, esperantigis kaj mem prezentis Eva Seemannová en historia kostumo, kiun preparis ankaŭ ŝi mem. Eĉ tiuj el la spektantoj, kiuj ne komprenis Esperanton, estis ravitaj de ŝia kultivita aktorado kaj klarpreciza prononcado.

La solena inaŭguro de ekspozicioj okazis je la 11-a horo, kiel anoncas la Kongresa Libro, tamen ne en la unua etaĝo, sed en la dua. Dum la solena inaŭguro muzikis s-anoj Rita kaj Franz-Georg Rössler. Oni povis ĝui arton de la artistoj: Jiří Čelíkovský (Ĝorgiano / Ĉelli) - pentraĵoj; Jaroslav Hradecký - plakaĵoj; prof. Jiří Hrcuba - plakaĵoj; Stanislav Krajčů-Pano - pentraĵoj; Blanka Zubová - pentraĵoj; Jindřich Havlík - grafikajoj; Rössler-Buckel Rita - pentraĵoj; Rössler Franz-Georg - pentraĵoj; Morteza Habibpur (Irano) - grafikajoj.

Ekspozicio de lernantoj de elementa artista lernejo, Praha, Vrovice, Bajkalsk 185, instruas: Jan Nevan, instruisto de pentro-arto kaj esperantisto. La infana ekspozicio por la kongreso ricevis titolon "Babelo aŭ Babilono". Ĝi prezentas en laboraĵoj de 5 - 14-jaraj lernantoj la faman miton de la Malnova Testamento kaj serĉas radikojn de

interkompreniĝo inter du direktoj: a) artista, b) lingva. Laŭ Biblio signifas Babelo konfuzon, sed en la realo en la babilona lingvo ĝi estis „pordego de dio“ (Babel) aŭ „pordego de dioj“ (Babilono).

Pragaj interesaĵoj

Al interesatoj pri Prago prelegis Staňa Chrdlová, kiu ankaŭ gvidis tri-lecionan kurson de la ĉeĥa lingvo „la ĉeĥa eksprese“.

Mardo, 23 julio - tago de la lernejo

TAGO DE LERNEJO

okazis marde en salono Karolo Piĉ, kiu estis plenplena.

S-ino Lucy Harmon informis pri nova 15-leciona vidbenda kurso produktada en Usono. Nova TV-vidbendo kun vivaj aktoroj, prezentantaj unu familion kaj ĝian ĉiutagan vivon, plaĉis pro sia ridiga spriteco.

Miroslav Malovec klarigis la eduk-sistemon en Ĉeĥio kaj eblojn de Esperanto-instruado.

Andrzej Pettyn el la E-Redakcio de Pola Radio prelegis pri la temo "Rolo de radioelsendoj en la memlernado de Esperanto". En la prelego li prezentis siajn multjarajn spertojn pri la temo kaj ankaŭ spertojn kolektitajn de aŭskultantoj. Cetere en la kongresa libroservo troviĝis kelkaj libroj kaj broŝuroj de Pettyn, i.a. „Ĉu vi volas paroli flue?“, „La E-fonetiko en praktiko“, „Esperanto en dialogoj“ kaj la plej nova „Esperanto laŭ amuzmetodo“, en kiu li prezentas

amuzajn kaj iafaje strangajn, sed tamen lernigajn novaĵojn kolektitajn el radioelsendoj kaj Esperanto-gazetaro.

Mila van der Horst-Kolinska kaj Katarina Bodnarová prezentis Cseh-metodan model-lecionon uzante la Mazi videobendan kurson. Sekvis demandoj de la publiko, kiu neniam perdis la intereson malgraŭ la longeco de la kunveno.

La reĝisoro Roman Dobrzynski eksplikis diferencojn inter MAZI TV-serio kaj vid-benda filmo kun prezento de almenaŭ du scenoj kun la ŝanĝoj (La ŝanĝojn faris li mem). Li substrekiĝis absolutan profesiecon, je ĉiu nivelo, de tiu ĉi vidbenda kurso, kaj la grandan donacon, kiun BBC faris al la movado petante por ĝi nur simblan licencpagon.

Surpriza programo de speciala (sekreta) gasto venis je la fino de la kunveno - fraŭlino Barlaston, nia konata kabared-isto, kiu ŝercis kun la publiko, legante tre sprite ĉapitrojn el Mazi-serio kaj eksplodigante ridegojn ĉe la aŭskultantoj.

Freŝdata kantaro por infan-instruado
"Vivu la kanto" estas nova kantaro, kiun pasintjare eldonis s-ro Ton Verwoerden el Nederlando. Infanoj ege ŝatas kanti kaj ludi. Kantante ili facile lernas Esperanton. Per ĉi tiu kantaro ili kantas konversaciajn kantojn, Mazi-kantojn, kurskantojn, variajn kantojn, ĉenkantojn. La kantaron ornamas muziknotoj, gitar-agordoj, infandeseĝnaĵoj kaj didaktikaj sugestaj. Ton Verwoerd, Luxemburghaan 545, NL-1966 HEEMSKERK

Jarkunveno de ISAE

La jarkunvenon de la Internacia Scienca Asocio Esperantista enhavis historian rerigardon de la prezidanto Prof. Stop-Bowitz sur la 90-jara historio de ISAE. Sekvis la honorigo de la eksigonta prezidanto kaj ties laboro por Esperanto kaj por la Asocio. La raporto de la sekr.-kasisto emfazis la definitivan finanĉan saniĝon de la Asocio kaj de ties organo Scienca Revuo post la grava krizo en 1988. Post unu horo okazis laŭ la programo kvar prelegoj - la tekstoj aperos en la Scienca Revuo. La redakcia komisiono intencis eldoni specialan kajeron honore al la jubileo kaj al la merita prezidanto. Kontribuoj dezirataj. ISAE cetere informas ĉiujn prelegintojn de la IKU, ke la redakcio de la Scienca Revuo estas ĝenerale preta, laŭ proponoj el la jarkunveno, publikigi la tekstojn de la IKU-prelegoj. Kontaktadreso por membriĝo aŭ abono (30,- svisaj frankoj jare): ISAE, R. Hauger, Ringstrasse 13, CH 8172 Niederglatt, telefona numero 0041-1-850 28 82

Jarkunveno de IFEF

okazis marde kun ĉeesto de 87 personoj el 19 landoj. La kunvenon prezidis István Gulys, vicprezidanto de IFEF, kiu raportis pri la 48-a IFEF-kongreso okazinta en Haago, Nederlando. Prezentitaj estis tri fakaj prelegoj el Germanio, Ĉeĥio, Slovakio. Eta grupo veturis al Eksperimenta Instituto de Ĉeĥa Fervojo, kie oni prezentis la provekzamenojn de la fervojaj kaj urbaj trajnlinioj.

Aŭtoraj duonhoroj

Per deklamo de „epopeo pri ŝtata kato, kiu malaperis sed poste reaperis en la rezidejo de la brita ĉefministro“, Marjorie Boulton amuzis ĉirkaŭ 40 aŭskultantojn. Demandita pri sia amo al katoj la doktorino respondis, ke ŝi ŝatas ilin, ĉar „ne estante alies edzoj ili estas karesablaj kaj ronronas.“ Responde al alia demando la eminenta aŭtorino malkaŝis, ke pli kaj pli ŝi konsideras verki libron pri siaj memoroj ĉar - kiel ŝi diris - kvankam ŝi ne trovas sian propran vivon tro interesa, ŝi renkontis interesegajn homojn en Esperantujo kaj tre logas ŝin esplori „kial iu personeco estas tia, kia ĝi estas“.

Tion jam faris la dua - posttagmeza - aŭtorino de tiu tago, Eli Urbanová, en sia aŭtobiografia romano *Hetajro dancas*, kiu vekis diferencajn reagojn en Esperantujo, de indigna rifuzado ĝis absoluta adorado. Same provoka estas ankaŭ ŝia nova poemaro *Peza vino*, en kiu aperas paralele ankaŭ la ĉeĥaj tradukoj de Josef Rumler.

Televida intervjuo pri la 81-a UK

Marde la 23-an la ŝtata Ĉeĥa televido elsendis en la tre ŝatata kaj multe rigardata programo "Studio 6" mallongan programeron pri la Praga kongreso kaj pri Esperanto ĝenerale. Intervjuitoj estis LKK-prezidanto V. Kočvara kaj komitatano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio Vlad. Hasala. Oni donis bazajn informojn pri ekesto de la lingvo kaj pri nuna stato de la movado. Ne mankis mencioj pri gravaj sesioj enkadre de la kongreso.

Komitato de UEA La Laborgrupo por varbado

Varbadon al UEA malhelpas ekonomiaj kondiĉoj: 1-monata salajro sufiĉas por 11 kotizoj en riĉaj landoj, 3 kotizoj en Paragvajo, 2-monata salajro pagas 1 kotizon en Nikaragvo. Kurioze estas, ke en Brazilo kotizo de UEA estas pli malalta ol tiu de la Brazila landa asocio.

En Nederlando evidenta utilo de servoj de UEA (Jarlibro, UK ktp.) altiras al tiu ĉi pli da membroj ol LA, dum en aliaj landoj la vico de aliĝo estas unue al LA, due al UEA.

UK estas granda logilo, eĉ mirakla, kvankam unufojaj aliĝintoj ofte eksigas la sekvan jaron. Aliaj homoj aliĝas nur por la Pasporta Servo.

Ĉie aĝo de LA-membroj estas alta. Oni celas junulojn, sed ili havas aliajn interesojn. En Germanio oni optimismas, ĉar maljunuloj havas tempon kaj monon, dum junuloj interesiĝas facile, inkluzive de Esperanto.

Konkretaj rimedoj proponitaj: Delegitoj estu utiligataj kaj edukataj por varbado. Kombinu varbadon por UEA kun tiu por LA. En Brazilo oni dissendas du aliĝilojn kune al 3000 personoj, inkl. eksaj membroj, el kiuj 700 revenas al lokaj grupoj. Estas efike distribui materialojn ĉe ekspozicioj por instruistoj.

IKU - Prelego pri Heyrovský

Marde dum IKU okazis du prelegoj. La unua pri la tutviva verko de akademiano Jaroslav Heyrovský, Nobel-premiito pri la ĥemio de 1959. La

ĉeestantoj aŭskultis pri fundamentoj de polarografio kiel scienca metodo kun ebloj utiligi ĝin en la praktiko, kun biografio de Heyrovský kaj lia scienca kaj homa heredo. La prelegon kompletigis televida filmo, en 1994 farita de Ĉeĥa Televido, kies direktoro Ivo Mathé volonte pruntis ĝin por la Esperanto-kongreso. La prelegon prezentis prof. V. Novobilský, CSc, rektoro de la kongresa universitato, kiu samtempe dublis la ĉeĥan filmon.

La duan prelegon prezentis RNDr. Josef Kavka pri Subakva vulkanismo en la nordbohema terciro, kaj kompletigis ĝin per ekzemploj de nordbohemiaj mine-raloj.

Vizito de infanoj

La geknaboj de la kongreseto en Rabyně vizitis la kongresejon kaj prezentis anataŭ la libroservo sian malgrandan kanto-programon.

Radio-intervjuo

La 24-an de julio 1996 redaktoro de la Ĉeĥa Radio, s-ro Josef Vomačka, intervjuis pertelefone rektoron de la Internacia Kongresa Universitato, prof. Dr. Vlastimil Novobilský. La interparolo estis elsendita vive pere de la plej aŭskultata radioprogramo "Radiožurnál" (Radioĵurnalo) kadre de la Ĉeĥa Radio. La rektoro respondis tri demandojn de la redaktoro, nome

1. kio estas IKU, ĝiaj celoj, temoj de la prezentiĝaj prelegoj

La rektoro klarigis al la aŭskultantoj la tradicion de la universitato, ĝiajn celojn kaj taskojn kaj menciis temojn de

ĉiuj 9 perelegoj, kiuj estis elektitaj el 27 proponitaj.

2. kiu estas la plej prominenta partoprenanto de IKU, pri kiu oni parolas

Respondo: prof. Reinhard Selten, Nobel-premiito, kiu prezentis prelegon pri ludo-teorio.

3. la stato de aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko

Prof. V. Novobilský koncize tuŝis unuopajn historiajn fazojn de scienc-teknika apliko de Esperanto kaj konstatis, ke ĝi kreskas ĉefe en lastaj jaroj, kiam aperas fakaj vortaroj kaj terminaroj, gazetoj specialigitaj por unuopaj fakoj.

NITOBESIMPOZIO

Marde vespere finiĝis la tritaga Nitobe-simpozio de internaciaj organizaĵoj pri lingvo por la internaciaj paco kaj demokratio, kiun organizis UEA paralele kun la 8-a UKE. En ĝi partoprenis reprezentantoj de UN, UNESKO, Eŭropa parlamento, internaciaj neregistartaj organizaĵoj kaj de UEA.

UEA organizis la unuan Nitobe-simpozion omaĝe al la fama japana diplomato Inazo NITOBES, kiu en 1921 ĉeestis la kongreson en Prago kiel ĝenerala sekretario de Ligo de nacioj. Li raportis pri lingvaj problemoj de komunikado kaj pri Esperanto kaj nomis ĝin "la motoro de internacia demokratio".

Dimanĉe la reprezentantoj de internaciaj organizaĵoj ekkonis la funkciadon de Esperanto kiel kongresa lingvo. Lunde la simpozianoj pritraktis la lingvajn politikon kaj praktikon en UNO kaj en

Esperanto-komunumo kaj ankaŭ la lingvan diversecon kaj lingvan demokration kaj la rolon de Esperanto en Eŭropo. Estis pridiskutitaj lingvaj programoj de UNESKO kaj edukado por la internacia konscio pere de Esperanto. Posttagmeze okazis la ronda tablo pri la lingvoj en internacia kunlaborado, kie reprezentantoj de kelkaj internaciaj organizaĵoj, kiuj uzas ankaŭ Esperanton, priskribis siajn spertojn.

Fine estis akceptitaj tri rekomendoj por la estonta kunlaborado inter internaciaj organizaĵoj. Grava estas la agado sur la kampo de protekto kaj konservado de la lingva diverseco en la mondo kaj de certigado de lingvaj homaj rajtoj, precipe en edukado. Necesas plibonigi la interkompreniĝon inter kulturoj kaj komprenon de mondaj problemoj. Gravas efika kaj altnivela internacia komunikado, sed oni devas konsideri ankaŭ egalecon kaj financon raciecon. Estis proponite fondi Centron por internacia lingva planado, kiu kunligus ĉiujn klopodojn por kvalita, efika kaj egalrajta komunikado inter homoj kun malsamaj gepatraj lingvoj.

MEDICINO DE LA SEKVONTA JARCENTO

Kio estas simpla por lernado kaj alte efektiva dum aplikado? Vi dirus: "Esperanto" kaj vi pravus, sed ekzistas ankoraŭ unu prava respondo: "Su Ĝok terapio". Tion povas konfirmi partoprenantoj de la Su Ĝok-terapiaj prezentadoj, kiuj okazis dimanĉe kaj marde.

Su Ĝok terapio uzas por kuracado, profilaktiko aŭ por la unua helpo

konformeajn sistemojn sur manoj kaj piedoj. En la korea lingvo "su" signifas mano, "ĝok" - piedon.

La metodon malkovris korea profesoro Pak Ĝe Vu el Seulo. Ĝi baziĝas sur multnacia kaj multmiljara orient-medicina sperto, kvankam ĝi mem estas nur ĉirkaŭ dekjara. La metodo ne estas elpensita - la konformeajn sistemojn dekomence enhavas la homa korpo. Per granda Amo la Naturo kreis homon kaj donacis al li memstarajn kuracajn sistemojn, por ke li mem helpu sin. Se la homa korpo ricevas tro malmulte da natura stimulado per la konformeaj sistemoj aŭ aperas iu ekstera malsaniga kialo, homo ekmalsanas. Per diverspeca iritado de la punktoj aŭ zonoj ĉe la konformeaj sistemoj sur manoj kaj piedoj ni povas sanigi la homon.

Ni prezentis kelkajn metodojn de la unua helpo. Por interesatoj ni aranĝas konstante ankaŭ divers-nivelajn kursojn (por ne-medicinistoj 12-horajn, por kuracistoj 12-tagajn).

Ekde tiu ĉi UK ni havos eblojn apliki la metodon pere de Esperanto. Nia slogano ne estas nova: "Metodo por lingvo, lingvo por metodo". Multaj el samideanoj, kiuj spertis ĝian efektivecon, ŝatus pli profunde lemi la metodon. Ĉiuj atendas la esperantlingvan libron "Su Ĝok por ĉiuj", kiun ni eldonos dum sekvontaj 2 monatoj. Venu al la prelego marde, por ke ni interkonsentu pri nia komuna agado por la sano kaj feliĉo ne nur de esperantistaro.

Alfredas Maruška

Arta programo

Brazila komponisto kaj kantisto **Flávio Fonseca**, sendita de la Brazilia ministerio de kulturo, koncertis en salono Lapenna, en salono Zamenhof la **Bulgara Esperanto-Teatro** prezentis vespere teatraĵojn *Triptiko* de Giorgio Silfer kaj *Lanĉo* de Emilija Lapenna (skizo el la vivo de L. L. Zamenhof).

Merkredo, 24 julio - ekskursata tago

La ekskursata merkredo forĝvidis la kongresanojn el Prago al tre diversaj anguloj de Ĉeĥio. Via raportanto direktiĝis (kun la tuta kongresa aro en 4 aŭtobusoj!) al unu el la miraklaj lokoj de la ĉeĥa kulturo - al Český Krumlov. La sorĉa urbo protektata de UNESCO ĉe la meandro de la plej fama ĉeĥa rivero Vultavo kaj konsiderata unu el la mondaj kulturaj trezoraĵoj, malkaŝis al ni la sekretojn de la kastelo Český Krumlov: belegan meblaron kaj valorajn artkolektojn - kiuj dokumentas pri la tempo kaj la regantoj de la kastelo ekde la 14-a jarcento. La kastela kapelo, nobelulaj dormejoj, manĝejoj, la amo per kiu oni tra jarcentoj gardis kaj riĉigis la kastelajn trezorojn, kontribuis al la tute specifa etoso: la ŝtormo, kiu trafis la kastelajn ĝardenojn kaj la urbon dum nia vizito, forportis nin el la reala mondo. Informitaj ĉiĉeronoj, kleraj tradukistoj, plaĉa manĝopaŭzo en la iama kastela stalo ripozigis la kongresanojn, lacajn de la tritaga kurado de programo al programo en la vastega kongresejo.

La merkreda vizito al Český Krumlov restos unu el la brilaj punktoj de la kongresa programo. Ĉeĥio per Český Krumlov havas plian kialon por vizito.

Spomenka Štítnec

Premion "Germain Pirlot"

Kadre de la inaŭguro de SUS 16, kiu merkrede je la 9-a okazis en Hotelo Forum, AIS transdonis la Premion "Germain Pirlot" por la jaro 1995. La premio iras al la sciencistoj Reinhard Selten kaj Jonathan Pool pro ilia verko "Enkodigo en la teorion de Lingvaj ludoj - ĉu ni lernu Esperanton?"

La Premio Pirlot estas ĉiujare aljuĝata al scienca verko, kiu almenaŭ duone estas en Esperanto. En 1996 la premion ricevis la Ukraina medicinisto I. Galaj-ĉuk pro la kongresvolumo "10-a Internacia Medicina Esperanto-Konferenco" redaktita de li.

Jaŭdo, 25 julio

Esperantologia konferenco

en la salono Hodler alportis interesajn temojn: *Esperanto movado - ĉu perdis komunumo?* Sociologie pri la specifeco de la eo-komunumo de Zbigniew Galor, *Infano de l' epoko: Moderneco kaj postmoderneco en la Esperanto-kulturo* de Mark Fettes, *Kiel lingvo generas kulturon* de Nikola Rašić, *Kio estas Esperanto-kulturo kaj kio ĝin karakterizas?* de Gerrit Berveling kaj *Originalaj Esperanto-kulturaj fenomenoj kaj ilia lingva reflektiĝo* de d-ro Aleksandr Melnikov.

Internacia Kongresa Universitato

En la plenŝtopita salono "Karolo Piĉ" daŭrigis sian laboron Internacia Kongresa Universitato. Kiel unuan prelegonton prezentis la rektoro al la publiko magistron Kep Enderby el Aŭstralio. Temo de lia prelego estis "La indiĝenaj popoloj de Aŭstralio". Al la aŭskultantaro estis prezentita resuma historio de la aŭstralia indiĝena loĝantaro ("aborigenoj") de la pratempe ĝis hodiaŭ. La priskribon de la kortuŝaj krimoj kontraŭ aborigenoj en la pasinteco sekvis priskribo de iliaj vivkondiĉoj en la nuna Aŭstralio.

En la dua prelego „Franz Kafka kaj Prago: verkisto kaj lia urbo“ koncentriĝis Doc. Dr. Mauro Nervi (Italio) al la Praga medio, en kiu F. Kafka literature aktivis. Detale estis priskribitaj lokoj, kie Kafka vivis, domaĝe, ke ilustraj lumbildoj mankis. Por la nedetale informita aŭskultanto la preleginto forgesis diri, ke la plej granda - de li menciata - kontraŭjuda pogromo dum la dua mondmilito estis organizita fare de nazioj kaj ke Prago kaj nemalproksima koncentrejo Terezín estis nur ĉeĥa tereno, sur kiu la krimo de faŝistoj estis plenumita. Alia rimarko: en 1918 oni proklamis ne la ĉeĥan, sed la ĉeĥoslovakon respublikon.

La kompletaj tekstoj de ambaŭ prelegoj estis por dispono al la interesatoj (por 15 CZK).

Vlastimil Novobilský

Jarkunveno de Esperantlingva Verkista Asocio (EVA).

Unue oni traktis plurajn asociajn aferojn. Vakas la sekretaria posteno; provizore, ĝis estos trovita nova funkciul(in)o, d-ro W. Verloren van Themaat plu faros la necesan laboron.

La prezidanto, Gerrit Berveling, klopodos okazigi lige al la planita Eŭropa Kongreso en Aalen (Germanio) en 1997 aranĝon nome de EVA pri literaturo.

Kun Fonto oni klopodos fari ian akcepteblan financan aranĝon, ĉar la kostoj de la dissendado de la n-roj kun EVA-komunikoj estas altaj. La Esperanta Jura Asocio estas petata doni informojn pri aŭtor-raĵoj.

Kun Edistudio EVA daŭrigos la kunlaboron pri premiado de novaj libroj. Aŭtoroj, kiuj jam aperigis plurajn librojn, estas invitataj aliĝi al EVA. La jara kotizo estas duono de M-jarlibro de UEA. Tiuj, kiuj ne jam vere famiĝis kiel verkisto, sed ja serioze tiusence laboras, povas peti aliĝon. Decidos EVA-komisiono.

Gerrit Berveling

ARTO

Posttagmeze ĝuigis la kongresanojn magiisto Trixini kaj koncerto de grupo Agordo, vespere la kabareda programo de fraŭlino Barlaston, kiu krom spritaĵoj ankaŭ kantis per surprize bela soprano (temas pri travestiita viro) arion de Najado kaj aliajn klasikaĵojn.

Vendredo, 26 julio - tago de la paco

Oficiala akcepto ĉe la vicĉefurbestro de Prago

La 26-an de julio 1996 la vicĉefurbestro de Prago Vladimír Drábek akceptis delegacion de esperantistoj, partoprenantoj de la 81-a Universala Kongreso de Esperanto, en la reprezenta salono de la praga Malnovurba Urbodomo. S-ro V. Drábek en sia alparolo salutis ĉiujn ĉeestantojn kaj esprimis sian konvinkon, ke la 81-a UK estos daŭre engravurita en la historion de Prago. Prezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Vlastimil Kovara, dankis la urbon Praha kaj la vicĉefurbeston mem pro la pozitiva rilato al la UK kaj rememorigis pri la 13a UK en Prago, kiu okazis antaŭ 75 jaroj. Dankojn al Prago kaj ĝia reprezentantaro por la subteno rilatanta al organizo de 81-a UK esprimis ankaŭ prezidanto de UEA, Lee Chong-Yeong. Lian finan demandon, ĉu nun la vicurbestro sentas sin amiko de Esperanto respondis V. Drábek jese.

La akcepto estis finita per tranigardo de historiaj salonoj de la Malnovurba Urbodomo.

Internacia Kongresa Universitato

En salono Lapenna estis prezentitaj la lastaj prelegoj.

Prof. D-ro John C. Wells (Britio) prezentis prelegon „Supersignoj, trasignoj kaj subsignoj“, kiu allogis multajn aŭskultantojn. Ili helpe de antaŭe disdonita

materialo povis konstati, kiel la ortografioj de diversaj lingvoj ekspluatas la eblon uzi kromsignojn por modifi la ordinarajn literojn. La preleginto finis sian parolon per konstato, ke „ni nun pasas el epoko, en kiu kromsigno estis problemo, al epoko, en kiu ĉio estos ebla". La prelegon sekvis tre riĉa diskuto.

En la lasta prelego d-rino Věra Barandovská-Frank (Ĉeĥio-Germanio) parolis pri „Jan Novák - reprezentanto de internacia novhumanisma kulturo". Oni aŭdis specimenojn el liaj poeziaĵoj kaj muzikverkoj (unu el ili kante prezentis la prelegantino mem). Oni ankaŭ sciigis, ke la „latinlingva scienca, literatura kaj muzika movado ne mortis".

La pres-servo disponigis al la interesatoj kopiojn de ambaŭ prelegoj.

Je la fino de la 9a kaj la lasta prelego el la prelegserio la rektoro de la ĉijara IKU, Prof. D-ro V. Novobilský, proklamis ĝin fermita.

Akademia Forumo de AIS

AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj) evidente subtaksis la interesecon de sia Akademia Forumo: Salono Bácskai montriĝis tro malgranda por la preskaŭ 50 homoj, kiuj volis aŭdi aŭ kundiskuti pri „Modifoj en la strukturo de AIS".

La diskuto, sub la lerta gvido de Prof. Dr. Werner Bormann, montris du precipajn direktojn:

* Starigo de regionaj klerigejoj parte etnolingvaj, por plivastigo de la stud-

oferto kaj konatigo de AIS;

* Plidetaliĝo de la strukturoj de la dua (humanistika) kaj kvina (naturscienca) sekcioj de AIS, laŭ proponoj el tiuj sekcioj.

Pri la unua punkto estis konstatite, ke eblas starigi klerigejojn de AIS surbaze de regionaj asocioj, t. e. kuniĝoj de subtenaj AIS-anoj. Jam sin anocis kunlabor-emuloj el Germanujo kaj interesuloj el Hungarujo. La duan punkton enkondukis klarigo de la scienca fakostrukturo de AIS, kiu sekvas logikajn apriorajn principojn, male al multaj nacinivelaj universitatoj.

Pro manko de tempo necesis prokrasti la pluan diskutadon al la venonta studadsesio, SUS 17 en Rimini (IT) kaj San-Marino (SM), kiu okazos de la 1-a ĝis la 7-a de septembro 1996.



Kongresanoj en la urbodomo

Kristana Kunveno

Ni venis multaj al ĉambro Symoens. Ni legis el la Biblio, preĝis kaj kantis. S-ro Gerrit Berveling parolis pri siaj tradukoj kaj precipe pri sia traduko de Duakanonaj libroj, kiuj espereble aperos poste inter la Malnova kaj la Nova Testamentoj de la Biblio.

Ceestis multe da membroj de la Katolika Unuiĝo (IKUE), kaj oni kuraĝigis ilin kunlabori kun membroj de Kristana Ligo (KELI) en multe da ekumenaj projektoj. Fakte multaj iros rekte post ĉi tiu kongreso al Szombathely en Hungario, kie okazos ĉijara Ekumena Kongreso. Tie oni decidis pri venontaj jaroj, sed estas preskaŭ certe, ke okazos Ekumena Kongreso en 1998 en Nantes, Francio, ĉar tiam ni solenas la kvarcentan datrevenon de la Edikto de Nantes, kiu proklamis liberecon ankaŭ al Protestantoj.

David Featherstone

Komuna silentado

Kvindeko da kongresanoj dum la vendreda posttagmezo forŝteliĝis de la kongresa bruado al salono Bácskai por duonhora komuna silentado. Tiu ĉi aparta formo de preĝado - meditado estis lanĉita de ISISTI rezulte de proponoj de la lastkongresaj IRKE-oj.

La tre pozitiva eĥo al tiu ĉi evento eble indikas la dezirindecon de tia retiriĝblo. Mi persone alrevas tiun tempon, kiam unu el la kongresaj servoj de UEA estos iaspeca konstanta interreligia kapelo dumkongresa, t.e. salonoj (et)o sole dediĉita al - eble nur silenta -

meditado, kontemplado, preĝado, devotado ...

Aŭtoraj duonhoroj

„LA AĴOJ KAJ SEZONOJ“ (PRO VIENO, 1995) estas la unua libro de Ulrich Becker, plurfoja premiito en la Belartaj Konkursoj de UEA. La juna aŭtoro rakontis pri la motivoj, kiuj impulsas lin verki, legis pecon de novelo kaj respondis demandojn de la interesiganta publiko. La verkojn de Becker karakterizas tre fajna sentivo.

Nekutiman prezentadon akceptis plej laste (vendrede) la Aŭtoraj Duonhoroj de la kongresa libroservo. Flávio Fonseca el Brazilo ne nur rakontis pri sia kariero de muzikisto, komponisto, sed regalis la aŭskultantaron per 3 kanzonoj.

En la libroservo ankoraŭ restas kelkaj ekzempleroj de lia kasedo, disko kaj ĵus lanĉita KD, en kio troviĝas lia komponaĵo "Babelturo", premiita en la Belartaj Konkursoj de UEA.

Internacia Arta Vespero

en la salono Zamenhof fermis kulturalan programon de la kongreso per sinprezento de preskaŭ ĉiuj artistoj, kiuj koncertis aŭ aktoris dum la semajno, aperis ankaŭ kelkaj novaj personoj, ĉar al la programo povis aliĝi ĉiu, kiu kuraĝis prezenti siajn kapablojn.

Prezentis sin ankaŭ la Internacia Kongresa Ĥoro, kiu estis formita el kelkdek kongresanoj kaj ekzercis dufoje tage ekde lundo.

Per parola vorto akompanis la vesperon d-rino Věra Barandovská-Frank.

Sabato, 27 julio

Solena fermo de la kongreso

Je la deka horo kolektiĝis en la salono Zamenhof ĉiuj kongresanoj, sur la podio eksidis la estaro de UEA. Pluraj parolantoj prononis sian opinion pri la kongreso kaj konstatis, ke ĝi estis sukcesa kaj plenumis sian celon. Kortuŝaj momentoj estis, kiam sin prezentis - iom hontemante - la infanoj venintaj el sia kongreseto en Rabynë kaj kiam la kongreson alparolis la kameruna esperantisto Victor Nto-Nto. Li estis la laste alveninta kongresano, ĉar survoje li estis kaptita kaj kvar tagojn prizonata de niĝeraj soldatoj. Tial li povis atingi Pragon nur jaŭde, preskaŭ je la fino de UK.

Poste oni invitis sur la podion ĉiujn, kiuj helpis prepari kaj organizi la kongreson. LKK-anoj ricevis bukedon da ruĝaj floroj kaj libron de Franz Kafka „Metamorfozo“ en traduko de Mauro Nervi. Ĉiujn helpantojn oni dankis per floroj kaj la publiko per longa aplaŭdo.

Fine la prezidanto de UEA, prof. Lee Chong-Yeong, invitis ĉiujn al la venontjara 82-a Universala Kongreso 1997 en la aŭstralia Adelajdo, kiu kurioze okazos „vintre“ (19-26 julio 1997), sude de la ekvatoro, kvankam la vintro estos tre modera, ĉar Adelajdo proksimas al la ekvatoro kiel ekzemple Bagdado aŭ Tokio. Poste li proklamis la kongreson fermita.

Simpozio alvokas al nova lingva ordo:

Prago, 26 julio 1996

La monda lingva ordo urĝe bezonas demokratian reformon, laŭ kunveno de ekspertoj el Unuiĝintaj Nacioj, Unesko, kaj aliaj internaciaj organizaĵoj.

La Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj alvokis al tutmonda debato pri lingvaj homrajtoj, lingva egaleco, kaj la kvalito kaj kost-eŭikeco de internacia komunikado trans lingvajn barojn.

„Ni instigas ĉiujn organizaĵojn kaj raciajn registarojn serioze alfronti la lingvan diskriminacion je ĉiuj niveloj, ekde edukado ĝis la funkciado de interpretaj servoj,” diris Mark Fettes, la Ĝenerala Sekretario de Universala Esperanto-Asocio, kiu organizis la dutagan kunvenon.

Laŭ Olivier Dupuis, deputito en Eŭropa Parlamento kaj preleganto en la Simpozio, la lingva egaleco en Eŭropa Unio proksimiĝas al krizo, kiun eblos eviti nur per la enkonduko de la internacia lingvo Esperanto kiel pontlingvo kaj neŭtrala dua lingvo por ĉiuj.

„Nek la pli malgrandaj lingvoj nek Esperanto minacas oficialajn naciajn lingvojn,” diris Allan Wynne Jones, prezidanto de Eŭropa Buroo pri Malpli Uzataj Lingvoj.

„Ni ĝuste volas konservi la diversecon de la lingvoj kaj kulturoj en la mondo,” li aldonis.

KONGRESA KOMUNIKO

En Prago ĵus finiĝis, kun 2971 kongresanoj el 66 landoj, la 81-a Universala Kongreso de Esperanto. Post 75 jaroj ĝi estis la dua UK en Prago. La datrevenon pligravigas la fakto, ke ĉi tie unuafoje okazis Nitobe-simpozio memore al Inazo Nitobe, iama Asista Ĝenerala Sekretario de Ligo de Nacioj, kiu kiel diplomato vizitis la Pragan UK-on en 1921, nomis Esperanton "motoro de internacia demokratio" kaj tre pozitive raportis pri siaj spertoj kun Esperanto. En la simpozio invititaj lingvistoj, politikistoj kaj aliaj fakuloj partoprenis prelegojn kaj diskutojn kun rilatoj al komunikado kaj lingva demokratio.

Dume miloj da kongresanoj ĝuis vicon da programoj kaj serioze laboris en kunvenoj de fakaj asocioj kaj aliaj kunsidoj.

Unuafoje okazis seminario pri lingvopolitiko de la Esperanto-movado, prezento de Su-Ĝok terapio, fondkunvenoj de nefumantoj kaj sociallaboristoj kaj konfirmiĝis agado de rondo-kato.

Estas prezentita Manifesto de Prago, kiu respondas al la bezono difini la aktualajn sencon kaj celon de esperantismo en formo klara por neesperantistoj, diskoniginda en aliajn lingvojn (jam tradukita en la anglan, ĉeĥan, francan, germanan, hispanan, hungaran, latinan, nederlandan, portugalan).

La kongresa temo *Kulturo - ĉu valoro aŭ varo?* estis traktitaj en du altnivelaj prelegaroj fare de verkistoj kaj kulturagantaj esperantistoj. Kvankam forte

konfliktis malsamaj opinioj, plejparto konsentis, ke kulturo devas esti varo altkvalita, en kiu komerceblo ne rajtas superi arton. Demokratio estas necesa, kvankam ne sufiĉa kondiĉo por alta kulturo.

Kadre de la tradicia Internacia Kongresa Universitato en 9 prelegoj elstaraj sciencistoj klerigis la publikon, kiu foje superplenigis la salonon. Du el la prelegoj, nome pri estetiko de beletra verko de prof. Ignat Florian Nociort kaj ludoteorio de Nobel-premiita prof. Reinhard Selten, daŭris ankaŭ per kompletiga kurso de Akademio Internacia de la Sciencoj - tia kunordigo de IKU kaj AIS okazis unuafoje.

Omaĝe al centjariĝo de la Esperanto-teatro efektiviĝis riĉa arta programo. Jam en la solena inaŭguro aperis apud muzikaj pecoj en prezento de bulgara Esperanto-Teatro ankaŭ fragmento el la teatraĵo *La unua brandfaristo* de Leo Tolstoj, kiu antaŭ cent jaroj en 1896 estis la unua esperantlingva teatra prezentado. Poste paradis aktorado de Eva Seemannová kun *Eliza Premislidino*, de Zagreba Studenta Esperanto-Klubo kun *Stilekzercoj* de Raymond Queneau, entuziasmigis la jam menciita bulgara Esperanto-teatro kun *Lanĉo* de Emilija Lapenna kaj *Triptiko* de Giorgio Silfer kaj *Lordino Makbeto* de Georgina Almanza. Ridsalvojn eksplodigis magiaĵoj de Trixini kaj farsaĵoj de fraŭlino Emily Barlaston.

En la muzikema Ĉeĥio ne povis manki recitaloj kaj kanto-prezentoj diversstilaj, muziko klasika de Aldo Florentin kaj de ĉeĥaj esperantistaj art-

istoj, kanzona de Jadwiga Dzignielewska, ĵazeca de Flávio Fonseca kaj korusa de Akordo. La internacia arta vespero rivelis aŭ konfirmis talentojn de esperantistaj amatoroj, ofte profesinivelaj.

La koridorojn de la dua etaĝo ĉarmigis pentraĵoj kaj grafikajoj de pluraj artistoj profesiaj, amatoraj kaj infanaj. En la libroservo prezentiĝis pli ol dek verkistoj kun siaj novaj verkoj en duonhoraj renkontiĝoj. Inter novaj titoloj krom originaloj aperis ankaŭ tradukoj, inter ili teatraĵo *Aŭdienco* de Václav Havel, alta protektanto de la kongreso.

La dumkongresaj diskutoj kaj ideoj denove pruvis, ke la esperantistaro survojas al la tria jarmilo kun fido kaj la konscio, ke la rolo de Esperanto kiel interhoma perilo povos nur graviĝi en la mondo, kie neegalranga komunikado kaj informado pli kaj pli postulos esence demokratian alternativon.



INFANA KONGRESETO -
LA ESTONTA ESPERANTISTA
GENERACIO

Premio "Wiener-Schmidt" por Prof. Dr. Miloš Lánský

La ĉijaran Premion „Wiener Schmidt“, aljuĝata de la Asocio pri Pedagogio kaj Informado (germane Gesellschaft für Pädagogik und Information - GPI) estis transdonita al Prof. Dr. Miloš Lánský pro elstaraj sciencaj kontribuoj al la progreso de la metodo de instruado. La premion transdonis Prof. Helmar Frank, prezidanto de la akademio (AIS), dum la solena fermo de SUS 16 (16-a studkonferenco de Akademio Internacia de la Sciencoj), en la Pedagogia Fakultato de la Karla Universitato en Prago.

ILEI-konferenco en Tábor

Tuj post la kongreso forveturis sepdeko da Esperanto-instruistoj kaj dek gimnazianoj al Tábor por trakti pri la instruado de Esperanto en la mondo. La prelegoj kaj kursoj trovis rifuĝejon en la ĉambroj de la Sudbohemia Universitato. Detalojn ni alportos en la venonta numero de Starto.

Ni kondolencas

La 15-an de julio 1996 forpasis en aĝo de 81 jaroj honora membro de ĈEA, s-ro Václav Špür, eminenta instruanto de Esperanto, meritplena ankaŭ en iama kolegio de Doksy. Mencias lin Karel Pič en Litomišla tombejo kaj Eli Urbanová en Hetajro dancas.

Kongresa Rezolucio

Al nova monda lingva ordo

La 81-a Universala Kongreso de Esperanto,

okazinta de 20 ĝis 27 julio, 1996 en Prago, Ĉeĥa Respubliko, kie kunvenis 2971 kongresanoj el 66 landoj,

aŭdinte la debatojn kaj rekomendojn de ekspertoj el Unuiĝintaj Nacioj, Unesko, Eŭropa Parlamento, kaj aliaj internaciaj organizaĵoj, kadre de la Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj pri „Lingvo por internaciaj paco kaj demokratio“.



konstatinte la gravecon de la principoj esprimataj en la Manifesto de Prago,

konfirmas la urĝan bezonon de vasta tutmonda diskuto pri la lingvaj homrajtoj, la lingva egaleco, kaj la neceso de efika kaj altkvalita komunikado trans lingvajn barojn,

emfazas, ke la Esperanto-komunumo jam atingis rimarkindajn sukcesojn sur tiuj terenoj, kiuj meritas seriozan esploron de kompetentaj lingvopolitikaj instancoj kaj fakuloj,

kaj **invitas** ĉiujn internaciajn organizaĵojn kaj lingvopolitikajn instancojn al kunlaboro kun la internacia Esperantomovado por la konstruado de pli justa kaj demokratia lingva ordo.

Ĝis revido en Adelajdo 1997



Odesílatel:

**Český esperantský svaz
ESPERANTO, p. s. 1069
111 21 Praha 1
☆ STARTO ☆**

**Periodikum Českého esperantského svazu (27. ročník)
Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno
Členská evidence a změny adres: Květa Hubnová, ČES Praha**

**Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (27-a jarkolekto)
Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio
Abonprezo: 15 gld
Redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno,
Ĉeĥio**

**Podávání novinových zásilek povoleno
Českou poštou, s. p., Odštěpným závodem Severní Morava,
č. j. 1533/95-P/1 ze dne 3. 8. 1995**

NOVINOVÁ ZÁSILKA

Poštovné hrazeno v hotovosti
u pošty 746 01 Opava 1